

# Festivala Folio

**BJELOVAR**  
**2017**  
**INTER-FEST**  
**KROATIO**

**n-ro 5**  
**merkredo**  
**la 9-an de aŭgusto**  
**2017**

KURIERO DE INTER-FEST

## AZIA PALETRO MALFERMITA

Kvankam estis labortago por multaj civitanoj de Bjelvoar, en la malfermo de la pentraĵ-ekspozicio *Azia paletro*, la mardan matenon (la 8-an) kolektiĝis en la Urba muzeo de Bjelovar konsiderinda nombro da ŝatantoj de pentroarto, kvankam estis labortago.

*Azia paletro* estas ekspozicio de pentraĵoj de la korea pentristo kaj esperantisto **HO Song** (1953). Kiel oficila reprezentanto la solenaĵon partoprenis la vicurbestrino, s-ino **Valna Bastijančić Erjavec**, kiu malfermis la ekspozicion, La malferman ceremonion partoprenis ankaŭ la direktoro de la muzeo s-ro **Milan Pavlović** kaj la pentristo mem.

En sia parolado la vicurbestrino Bastijančić Erjavec salutis la partoprenantojn kaj la azian gaston nome de la urbestro **Dario Hrebak** kaj sia propra, dankis al li pro la alveno kaj transdonis kiel donacon de Urbo Bjelovar la monografion *Nefinita memorlibro*.

**Franjo Forjan**, la prezidanto de la Bjelovara esperantista societo, simbole transdonis al la korea artisto mielkukan koron kaj konkon kun lavando.

La artisto Ho Song en sia alparolo dankis al la organizantoj de la ekspozicio pro la klopodoj konigi al la publiko liajn verkojn, al s-ino vicurbestrino kaj aparte al la Urba muzeo kiu akceptis la ekspozicion en siaj ejoj. Li emfazis, ke tia ekspozicio ne povus okazi sen Esperanto.

En la ekspozicio estas prezentitaj 24 pentraĵoj, ĉefe olepentraĵoj sur tolo, sed ankaŭ en aliaj teknikoj.



*La korea pentristo HO Song  
akceptas donacojn*

## EKSKURSOJ - NEPRE TRALEGU!

La **ekskurso E-4** (Zagreb-Stubica-Kumrovec) startos la 10-an de aŭgusto el la parkejo en **Trg hrvatskih branitelja** je la 7h00. La ekskurson gvidos profesia ĉiĉerono (en Esperanto) Neven Kovačić.

La **ekskurso E-5** (Varaždin-Trakošćan) startos la 11-an de aŭgusto el la parkejo en **Trg hrvatskih branitelja** je la 7h00. La ekskurson gvidos profesia ĉiĉerono el Varaždin (iama lerninto de Esperanto).

Por la menciitaj ekskursoj disponeblas ankoraŭ pluraj lokoj en la busoj, do oni povas aliĝi ankaŭ hodiaŭ ĉe la festivala sekretario: +385 98 248 574.



# Azia paletro



## SUKCESA KUNLABORO INTER DEC KAJ BEA

Antaŭ du jaroj komenciĝis la kunlaboro inter Dokumenta Esperanto-Centro (DEC) en Ĝurđevac (Kroatio) kaj Bulgara Esperanto-Asocio (BEA) en Sofio. DEC eldonis kelkajn tre valorajn Esperanto-librojn de bulgaraj esperantistoj: *La viro en la pasinteco* – novelaro de **Julian Modest**, *Vaganto inter la steloj* – poemaro de **Venelin Mitev** kaj *Brakumi la mondon per Esperanto* – rememoroj de **Nikola Uzunov**.

La 8-an de aŭgusto **Georgi Mihalkov**, prezenti *Brakumi la mondon per Esperanto* kaj *La viro el la pasinteco*.

Nikola Uzunov estis unu el la plej elstaraj bulgaraj esperantistoj. Jam kiel soldato li komencis lerni Esperanton kaj dediĉis sian tutan vivon al la Esperanto-movado. Li estis organizanto de pluraj aranĝoj en Bulgario, Esperanto-instruisto, talenta tradukisto el la bulgara lingvo al Esperanto. Li tradukis kelkajn tre gravajn bulgarajn verkojn: *Ŝtelisto de persikoj*, romano de Emilian Stanev, *Rakontoj de Ĉudomir*, *Anekdotoj pri Gabrovanoj* kaj aliajn.

Uzunov verkis originale en Esperanto. Li estis aŭtoro de pluraj Esperanto-poemoj. En *Brakumi la mondon per Esperanto* Nikola Uzunov konfesis: "Ĉar Esperanto donis al mi multe, ĝi ankaŭ

postulas de mi havigi miajn sperton, talenton kaj fortojn por la prospero de tiu nobla kaj bela lingvo, kiu havas estontecon. Mi kredas, ke venos la tempo kiam la homoj en la mondo aprezos la valoron de Esperanto. Tial mi esperas, ke Esperanto estas ne nur lingvo de nia pasinteco kaj nuntempo, sed ankaŭ la internacia lingvo de nia futuro".

Georgi Mihalkov prezentis sian libron *La viro el la pasinteco*. Li diris al la ĉeestantoj, ke la rakontoj en la libro plej bone esprimas la aŭtorajn meditojn, strebojn, revojn kaj tiam li tralegis la rakonton *La knabo kun la kvin ridetoj*. Post la tralego de la rakonto estis demandoj. **Neven Kovaĉić** demandis pri la turka minoritato en Bulgario kaj ĉu estas esperantistoj inter la bulgaraj turkoj. Mihalkov respondis, ke ne multaj el la bulgaraj turkoj lernas Esperanton. **Tomasz Chmielik** rakontis pri la redaktado de la du libroj (*Brakumi la mondon per Esperanto* kaj *La viro el la pasinteco*). Li diris, ke la libro de Nikola Uzunov estas tre grava por la esperantistoj ĉar ĝi prezentas momentojn el la historio de la Esperanto-movado. Chmielik diris ankaŭ, ke en la libro *La viro el la pasinteco* Mihalkov bele tre priskribis siajn personajn emociojn.

(Georgi Mihalkov)

# TIKIRIKI TOK EL STROBILO - ALLOGA LIRBO POR INFANOJ

En la originala Esperanta literaturo preskaŭ mankas libroj por infanoj. Ni deziras, ke niaj infanoj lernu Esperanton kaj jam en la infanaĝo ili eniru en la mirindan mondon de la Esperanta literaturo, sed por tio necesas bonaj kaj allogaj infanaj libroj. DEC bone komprenis tiun bezonon kaj jam eldonis kelkajn tre interesajn librojn. La plej nova estas *Tikiriki Tok el Strobilo* de la talenta israela Esperanto-verkistino **Luiza Carol**.

La 8-an de aŭgusto la libron de Luiza Carol prezentis la konata Esperanta poeto kaj literatura kritikisto **Zdravko Seleš**. Li detale parolis pri la vivo kaj kreado de la verkistino. Seleš emfazis, ke Luiza Carol havas la talenton verki por la infanoj amuze kaj allogge. Ŝi tre bone uzas la vortludojn, vekas la fantazion de la infanoj kaj priskribas mirindajn, gajajn okazintaĵojn.

S-ro Seleš havis du ĉarmajn helpantinojn: **Mihela Cik** kaj **Andrea Horvat**, kiuj legis



fragmentojn el la libro. Ilia inspira legado ilustris la verkistan majstrecon de Luiza Carol, kiu rakontas al la infanoj per facila, klara kaj atentokapta stilo.

(Georgi Mihalkov)

## Koncize

**KONCERTO EN LA MUZEO:** La anoncitaj polaj muzikistoj el Bjelistoko, bedaŭrinde ne venis al Bjelovar, sed la organizantoj ne volis lasi la publikon sen koncerto, do la 8-an de aŭgusto en la Urba muzeo anstataŭ la pola grupo ludis la duopo Françoise kaj Dédé.

**NI LERNU LA KROATAN:** Koncizan kurseton de la kroata lingvo je la 13h00 en la Altlernejo gvidis profesorino Marija Jerković el Zagrebo.

**POLA-KROATA ELDONA KUNLABORO:** Je la 16h00 la 8-an de aŭgusto pri la pola-kroata eldona kunlaboro detale parolis kaj per ekzemploj ilustris ĝin Tomasz Chmielik el Pollando.

*Fotis Sanja Pleskina Forjan*



## LA FESTIVALO DE PERDITAĴOJ

La festivalan semajnon ni memoros laŭ multaj perditaj aĵoj, en kio la ĉampiono estis la festivala sekretario, kiu perdis almenaŭ 5 ekzemplerojn de la *Festivala libro*, unu verdan notlibron kaj kelkajn aliajn paperaĵojn. Sed ne postrestis ankaŭ la aliaj festivalanoj.

Sinjoro el Zagrebo perdis sian verdan sakon, alia sinjorino sian dorsosakon lasis en la Kutlurdomo, pro kio ni devis peti la domgardiston veni kaj redoni ĝin.

Perdiĝis ankaŭ okulvitroj, manhorloĝo, ŝlosiloj, 2 boteloj da olivoleo. Alia sinjorino lasis en la buso saketon kun la ŝlosiloj de sia loĝejo, pro kio la buso devis reveni al Zagrebo. Perdiĝis eĉ unu festivalano!

Unu sinjoro forgesis veni al la buso, alia ne venis en la loĝejon menditan por li, sed sen klarigo revenis al Zagrebo.

Sed, karaj festivalanoj, estu senzorgaj, ĉar preskaŭ ĉio estis retrovita, inkluzive de la perdiĝinta samideano!

# Publike

Nekutime grandan interesiĝon de la gazetaro, radio kaj televido elvokis nia Festivalo. Ni ankoraŭ ne povas kompili kompletan liston de ĉiuj raportoj, sed jen kelkaj interesaj:

La festivala sekretario la 7-an de aŭgusto donis intervjuojn al la **Radio Slavonski Brod** kaj al la portalo **Bjelvoar.live**.

La 8-an de aŭgusto la festivalan sekretarion intervjuis **Radio Split, Kroata katolika radio** kaj speciale por interparoli kun la festivalaj prezidanto kaj sekretario el Zagrebo venis ĵurnalistino Katarina Kolega farinte longegan intervjuon por la du programoj de la **Kroata radio**, interalie interparolinte ankaŭ kun kelkaj eksterlandaj festivalanoj.

**Bjelovarski list** n-ro 455 de la 7-a de aŭgusto publikigis ampleksan artikolon *Osam dana u znaku koncerata, izložbi, predavanja gostiju iz cijelog svijeta* (Ok tagoj en la signo de koncertoj, ekspozicioj kaj prelegoj de gastoj el la tuta mondo).

Pri la festivalo abunde raportis per fotoj la portalo de **Kroata Esperanto-Ligo**.

Gravan raporton diskonigis **HINA** (Kroata informa novaĵagentejo) en la oficiala retejo.

La regiona portalo **Bjelovar.info** publikigis du longajn kaj detalajn raportojn: *U Domu kulture Bjelovar otvoren Međunarodni esperantski kulturni festival INTER-FEST 2017* (En la Kulturdomo malfermita Internacia Esperanta kultura festivalo INTER-FEST 2017) kaj *Započeo prvi bjelovarski Inter-Fest, u Bjelovar pristigli esperantisti iz cijeloga svijeta* (Komenciĝis la unua bjelovara Inter-Fest, al Bjelovar venis esperantistoj el la tuta mondo).

La portalo de **Mreža TV** raportis sub la titolo *Bjelovar domaćin INTER-FESTA* (Bjelovar estas gastiganto de INTER-FEST).

La portalo de la **Kroata televido** diskonigis la informon sub la titolo: *Prvi Inter fest - tjedan esperantske kulture* (La unua INTER-FEST - semajno de la Esperanta kulturo).

La portalo **Obavještajac.hr** en Bjelovar publikigis la artikolon *Otvoren prvi Inter-fest – Festival esperantske kulture* (Malfermita la unua INTER-FEST - Festivalo de la Esperanta kulturo).

En la portalo **www.izravno.com** aperis la artikolo *Bjelovar: Otvoren prvi Inter-fest - Festival esperantske kulture* (Bjelovar: Malfermita la unua INTER-FEST - Festivalo de la Esperanta kulturo).

---

## AMUZA BABILADO EN LA KAFEJO ZAGORJE

La 8-an de aŭgusto post la seriozaj prelegoj kaj diskutoj, la partoprenantoj de INTER-FEST kolektiĝis en la eleganta kafejo *Zagorje*, kie ili daŭrigis siajn debatojn, sed nun ŝerce kaj amuze. Mikaelo Bronŝtejn, Tomasz Chmielik, Françoise Noireau, Lidia Ligęza kaj Georgi Mihalkov rakontis anekdotojn kaj ŝercojn, kiuj provokis gajan ridon.

Iuj eble opinias, ke en Esperanto ne estas folkloro, sed ili eraras. Esperanta folkloro estas vere multkolora kaj riĉa. La anekdotoj kaj ŝercoj respegulas la gajan pensmanieron de la esperantistoj.

La leĝera konversacio estis tre utila ĉar en tiuj ĉi liberaj paroladoj estis vortoj, kiujn oni neofte uzas kaj kiuj bone montras kiel riĉa kaj buntkolora estas la Internacia Lingvo.